

August Heinrich Hoffmann, Abendlied <i>tradukita de Manfredo Ratislavo</i>	August Heinrich Hoffmann, Abendlied	August Heinrich Hoffmann, Vespera kanto <i>tradukita de Manfred Retzlaff</i>	August Heinrich Hoffmann, Vespera kanto <i>tradukita de Manfred Retzlaff</i>
Nun vesper' fariĝas Ree tie ĉi, Paco subeniĝas Kaj ripozas ni.	Abend wird es wieder, über Wald und Feld säuselt Frieden nieder, und es ruht die Welt.	Surkampare iĝas ree nun vesper', milde subeniĝas paco de l' eter'.	Ree vesperiĝas ĉie en la rond', paco subeniĝas kaj ripozas mond'.
Rivereto fluas Ĉe la roko sen Ĉeso kaj ĝi bruas Plu kaj plue jen.	Nur der Bach ergießet sich am Felsen dort, und er braust und fließet immer, immer fort.	Nur de l' roko bruas rivereta flu', kaj la akvo fluas ĉiam ĉiam plu.	Riveret' nur fluas ĉe la roko jen, kaj ĝi daŭre bruas plu kaj plu sen ĝen'.
Sonoril' neniŭ Ripozigas ĝin, Ne dormigas iu Ĝin je l' tagofin'.	Und kein Abend bringet Frieden ihm und Ruh', keine Glocke klinget ihm ein Rastlied zu.	Ne haltigas iu ĝin je l' tagofin', kaj vesper' neniŭ ripozigas ĝin.	Ne vespero iu endormigas ĝin, sonoril' neniŭ je la tago-fin'.
Tia, mia koro, Estas ankaŭ vi. Donu, ho Sinjoro, Pacon vi al ĝi.	So in deinem Streben bist, mein Herz, auch du. Gott nur kann dir geben wahre Abendruh!	Mia kor', senlace strebas ankaŭ vi, vi ripozos pace, nur se volos Di'.	Mia koro, tia estas ankaŭ vi! Pacon trovos mia koro nur en Di'.
...

Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, *1798-04-02 - †1874-01-19) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2012-11.

Arg-645-1378 (2012-11-27 18:34:25)

Vidu ankaŭ: [http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_\(Fallersleben\)](http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_(Fallersleben)). La muziknotoj troviĝas en http://www.lieder-archiv.de/abend_wird_es_wieder-notenblatt_300026.html, la melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, *1798-04-02 - †1874-01-19).

Arg-645-1300 (2012-11-27 18:18:40)

Siehe auch: http://de.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben. Vidu ankaŭ: http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben kaj <http://www.musicanet.org/robokopp/fallers.html>. Siehe auch: <http://www.swr.de/swr2/program/sendungen/wiegenlieder/rueckschau/-/id=556006/nid=5556006/did=6102144/pv=mp3player/vv=popup/1vijptk/index.html>.

Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, *1798-04-02 - †1874-01-19) en Esperanton de MANFREDO RETZLAFF (*1938-11-04) en 1988-04-16.

MR-212.1 / Arg-645-1302 (2012-11-04 23:01:54)

Pri la aŭtoro vidu la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben. La melodion verkintan de Christian R. Rinck oni povas aŭdi en <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/abendwir.html>. Pri la komponisto rigardu: http://de.wikisource.org/wiki/ADB:Rinck,_Johann_Christian_Heinrich.

Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, *1798-04-02 - †1874-01-19) en Esperanton de MANFREDO RETZLAFF (*1938-11-04) en 2013-01-27.

Arg-645-1943 (2014-01-28 23:29:57)

La melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.